

Pintkunsido Caricom-Kubo: por unueca kaj prospera Karibio



Havano, 8 dec (RHK) La kuba prezidento Raúl Castro partoprenis la pintkunsidon de la kariba komunumo de ŝtatoj, Caricom kaj Kubo, kune kun ampleksa delegitaro.

La kunsido komenciĝis vendrede en Saint Mari, Antikvo kaj Barbudo, kie gvidantoj el la 15 landoj plus Kubo, renkontiĝis kun la celo impulsi la solidarecon kaj regionan integriĝon.

Dum la renkontiĝo, oni subskribis memorando de interkompreno por kunlaboro inter la civila defendo de Kubo kaj la kariba agentejo por mastrumo de damaĝoj kaj urĝoj, kio konsistigas gravan paŝon por alfronti la naturfenomenojn kiuj ŝiujare kaŝzas detruojn en la kariba regiono.

Oni anoncis daŝrigon de komunaj projektoj kiel esprimo de politika volo de ŝiuj registaroj, interalie, tiu pri la regiona lernejo de artoj en Jamajko kaj la centro por stimuli la evoluon de infanoj, adoleskantoj kaj gejunuloj kun edukaj bezonoj specialaj, kies sidejo estos en Gujano, kio multe progresis.

En sia parolado dum la plenkunsido, Raúl dankis la decidon de la honorinda Gaston Browne kaj ties registaro, kiuj spite al la malfacilaĵoj alfrontataj de post la detrua uragano Irma, ne ŝesis en la celo garantii ŝiujn kondiĉojn por sukcesa okazigo de tiu ĉi sesa pintkunsido Caricom-Kubo.

Li alvokis la ŝtatestrojn organiziĝi por postuli justan agadon de la industriiĝintaj potencaj landoj por mildigi kaj adaptiĝi al efikoj de la klimata ŝanĝo, aparte per financaj rimedoj kaj teknologio-transdono ; konkretigi

celojn pri la Agendo 2030 por daŝrigebla evoluo, speciale por kolektive alfronti la mekanismojn de regado altrudataj de la maljusta financa sistemo internacia.

Li konfirmis la sintenon de Kubo subteni en ŝiuj cirkonstancoj la rajton de la etaj insulaj ŝtatoj kaj evoluantaj landoj, ricevi specialan kaj diferencitan traktadon en la aliro al komerco kaj investoj.

La gvidantoj de la karibaj landoj esprimis sian kontenton pri la kunsido kiu konfirmas ke Karibio pli prospera, egalrajta, sekura, daŝrigebla kaj unueca estas ebla.

<http://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/149853-pintkunsido-caricom-kubo-por-unueca-kaj-prospera-karibio>



Radio Habana Cuba